

2a DIMANĈO DE ADVENTO – 4-a de decembro 2016

KONVERTIĜU, ĈAR ESTAS PROKSIME LA REGNO DE LA ĈIELO.

El la evangelio laŭ Mateo 3, 1-12
Komento de p. Alberto Maggi OSM

En tiuj tagoj venis Johano, la Baptisto, predikante en la dezerto de Judeo. Li diris: „Konvertiĝu, ĉar estas proksime la regno de la ĉielo.”

Pri Li aludis la profeto Jesaja, kiam li skribis ĉi tiujn vortojn:

*„Voĉo de krianto en dezerto:
pretigu la vojon de la Sinjoro,
ebenigu liajn irejojn.”*

Johano havis veston el kamelaj haroj kaj ledan zonon ĉirkaŭ siaj lumboj, kaj lia nutraĵo estis akridoj kaj sovaĝa mielo.

Amasoj aliris al li el Jerusalemo, el la tuta Judeo kaj el la ĉirkaŭaĵo de Jordano. Ili konfesis siajn pekojn, kaj estis baptitaj de li en la rivero.

Ankaŭ multaj el la fariseoj kaj sadukeoj venis al lia baptado. Kiam li vidis ilin, li diris: „Vipuridoj! Kiu diris al vi, ke vi eskapos de la venonta kolero? Konduitu do kiel sincere pentantaj homoj! Ne iluziĝu dirante en vi mem: Ni estas filoj de Abraham; ĉar mi diras al vi, ke Dio povas el ĉi tiuj ŝtonoj starigi idojn al Abraham. Jam la hakilo kuŝas ĉe la radiko de la arboj; do ĉiu arbo, kiu ne donas bonan frukton, estos dehakata kaj ĵetata en fajron. Mi vin baptas nur per akvo por stimuli vin al pento; sed tiu, kiu venas post mi, vin baptos per la Sankta Spirito kaj fajro: Li estas pli potenca ol mi, kaj mi eĉ ne estas inda porti liajn ŝuojn, Lia ventumilo estas en lia mano, kaj Li purigos sian draŝejon kaj kolektos sian tritikon en la grenejon; sed la pajlon Li bruligos per fajro neestingebla.”

La tria ĉapitro de la evangelio laŭ Mateo malfermiĝas per formulo, aperanta nur ĉi tie en lia evangelio: “*En tiuj tagoj*”.

Per tiu formulo Mateo intencas memori la libron Eliro: “*En tiuj tagoj Moseo, iĝinte pli aĝa, vizitis siajn gefratojn kaj rimarkis kiel penigaj estas la taskoj de ili plenumendaj* (El 2, 11). Do estis la tempo, en kiu Moseo ekkonsciigis pri la situacio de sia popolo, pro kio li ĝin liberigos: do per tiu frazo “*en tiuj tagoj*”, uzita dufoje, Mateo kunligas la komencon de la liberigo

fare de Moseo kaj la komencon de la agado de Johano, daŭrigota de Jesuo: eliro kaj liberigo, ni vidos de kio.

Do: *"En tiuj tagoj venis Johano (la nomo signifas "La Sinjoro estas mizerikordo), la Baptisto; li estis jam konata kun tiu epiteto, ĉar li baptadis, kaj ni lernos poste, kion tio signifis, predikante en la dezerto de Judeo: (ĝi etendiĝis de Jerusalemo ĝis Morta maro: ĝi ne estas sabla, sed roka, monta). Li diris: "Konvertiĝu". Ĉi tiu estas samtempe anonco kaj ordono. En ĝi estas reeĥo de profeto Jesaja: "Ĉesu agi malbone kaj agu bone, kaj viaj pekoj estos pardonitaj" (Jes 1,18).*

Kaj tiu konvertiĝo estu ŝanĝo de la pensmaniero, kiun sekvu ŝanĝo en la agmaniero, orientado de sia vivo al la bono de la aliaj ...*ĉar estas proksime la regno de la ĉielo* (estas la unua fojo, en kiu Mateo uzas tiun esprimon, kiun la aliaj evangeliistoj ne uzas; ni ne konfuzu la "regnon de la ĉielo" kun la "regno en la ĉielo"; Mateo verkas por Juda komunumo, li tre atentis pri ĝia sentiveco, kaj ĉiufoje kiam li povas li evitas uzi la vorton Dio, kiun, kiel sciante, Judoj nek skribas nek eldiras. Nu, "regno de la ĉielo" ne signifas "regno en la transmondo", sed la "regno de Dio", Dio kiu regas la siajn.

"Pri Li aludis la profeto Jesaja, kiam li skribis ĉi tiujn vortojn:", kaj ĉi tie la evangeliisto citas profeton Jesaja, tamen modifante ĝin, ĉar en la 40-a ĉapitro de profeto Jesaja, ĉe versiklo 3, oni legas: *"Voĉo de kianto: en dezerto pretigu la vojon de la Sinjoro"*, kaj ĝi estis la anonco de la fino de la deportado en Babilonon, per la edikto de Ciro, kaj la komenco de la liberigo, kaj do *"en dezerto pretigu la vojon de la Sinjoro"*. La evangeliisto modifas la eron de Jesaja: *"Voĉo de kianto en dezerto"*, do el la dezerto, el la rompo kun la socio, alvenas ĉi tiu anonco: *"...pretigu la vojon de la Sinjoro, ebenigu liajn irejojn"*.

Poste la evangeliisto ekpriskribas la figuron de Johano, donante klarajn referencojn: "li havis veston el kamelaj haroj", ĝi estis la tipa vesto de la profetoj, sed kun aldona detalo: *"kaj ledan zonon ĉirkaŭ siaj lumboj"*. La evangeliistoj estas ĉiam ŝparemaj pri ekzemploj, pri rimarkoj, kiam ili tiujn metas, tion ili faras pro iu klara teologia signifo. La leda zono ĉirkaŭ la lumboj estis la distingilo de tiu kiu estis konsiderata la plej elstara el la profetoj, profeto Elija, kiu, tion oni kredis, estis venonta por pretigi la vojon de la Mesio. Do la evangeliisto identigas, en la figuro de Johano, profeton Elija. *"...kaj lia nutraĵo estis akridoj kaj sovaĝa mielo"*, tio kion proponis la dezerto, la tipa nutraĵo de beduenoj.

Estas sensacia tio kion la evangeliisto skribas: *"Amasoj aliris al li el Jerusalemo, el la tuta Judeo kaj el la ĉirkaŭaĵo de Jordano"*. Johano predikis ŝanĝon de vivo, kaj la tuta atendo de la popolo reflektiĝas en tiu "Jerusalemo", "Jordano", kiu aliras al li. Ili komprenis, ke la instrumentoj al ili proponataj de la religiaj institucioj ne estas taŭgaj, kaj ili aliras al li.

"...Ili estis baptitaj de li en la rivero", bapto estis konata rito, ĝi estis enmergiĝo, per kiu oni signifis la morton al propra pasinteco, por komenci novan vivon. *"...en la rivero Jordano"*: estas grava la indiko farata kaj ripetata

de la evangeliisto. Jordano estis estinta la fina etapo de la eliro por eniri en la promesitan landon, nun ĝi estas la komenca etapo por eliri el la promesita lando, ĉar la lando de libereco, en la manoj de la ĉefpastroj, de la skribistoj, de la fariseoj, de la tuta pastra kasto, de la religia institucio, estis transformiĝinta al lando de subpremado, de kie oni devas eliri, kaj do Johano anoncas la eliron kiu estos plenumata de Jesuo.

"... *Ili konfesis siajn pekojn*": la verbo konfesi ne igu pensi je tio, kion ni nomas konfeso. Ĝi estis gesto, enmergiĝo en la akvon, per kiu oni rekonis sin pekuloj. Kiam alvenas la reganta pastra kasto, la religia elito reprezentita de fariseoj kaj sadukeoj, Johano la Baptisto ne bonvenigas ilin, li ilin akceptas per fajraj vortoj, ĉar li scias, ke ili venas por plenumi riton. Johano diras: ne, "*kondutu kiel sincere pentantaj homoj!*", tio estas, la ŝanĝo de vivo devas esti videbla en la konduto, sed poste ni vidos en la evangelio ke tiuj neniam kredos je la agado de Johano la Baptisto.

Por fini la pecon, kiu estas tre riĉa, Johano diras: "*Mi vin baptas nur per akvo por stimuli vin al pentado*", do la gesto proponata de Johano estas iu vivoŝanĝo, farata pere de ĉi tiu enmergiĝo, sed li ne povas doni la forton por plenumi ĉi tiun vivoŝanĝon. Li diras ke estos iu kiu estos "*pli potenca ol mi... li vin baptos per la Sankta Spirito kaj fajro*". La bapto per la akvo signifas la enmergiĝon en likvaĵon eksteran al la homo. La bapto per la Spirito, la Spirito estas la vivo de Dio, estas la amo de Dio, signifas trempiĝon en la vivon mem de Dio. Tio donos la forton por antaŭenigi poste ĉi tiun konvertiĝon, ĉi tiun ŝanĝon. Tamen Johano la Baptisto diras: "*... kaj fajro*": la Sankta Spirito, por tiuj kiuj akceptas ĉi tiun inviton al konvertiĝo, kaj fajro, laŭ la tradicia pensmaniero, estis la puno de Dio por tiuj kiuj ĝin malakceptis.

Fakte konklude diras Johano: "*Lia ventumilo estas en lia mano, kaj Li purigos sian draŝejon kaj kolektos sian tritikon en la grenejon; sed la pajlon Li bruligos per fajro neestingebla*". Do Johano la Baptisto, heredanto de la tradicio de la Malnova Testamento, prezentas juĝon de Dio, kaj ĉi tiu juĝo de Dio estos poste kerekta de Jesuo. Kiam en la Agoj Jesuo rilatigos sin al tiu bapto, li diros: "*Vi estos baptitaj per la Sankta Spirito*". Fare de Jesuo, kiu estas la ĉeesto de Dio en la homaro, estas nur anonco, propono de vivpleneco, en li forestas ĉia formo de puno.